

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 12

N-ro 1, 1982

Edistudio, Pizo, Italujo

Enhavo

Mario Dazzini: Kvindek jaroj da laboro por Esperanto

La teorio de lingvoinstruado (unua parto)

La stato kaj la tendencoj de la aplikado de Esperanto en la sciencoj kaj fakoj en majo 1981

La intelekta evoluo de la infanoj

Koordinatoj

Estraraj raportoj 1979-1982

István Szerdahelyi

Ottó Haszpra

Hans Gransee

Corrie Sanders, Nederlando

Mario Dazzini: Kvindek jaroj da laboro por Esperanto

1967 estis la jaro de mia unua renkontiĝo kun Mario Dazzini. Vizitante la 52-an UEA-kongreson en Rotterdam (kiu ja anstataŭis Tel Aviv), mi partoprenis fakan kunvenon de ILEI: d-ro Dazzini raportis pri la farita laboro.

Unu jaron post tiu ĉi efemera informado ni ambaŭ komencis rekte serioze kaj intense kunlabori: por ILEI — por Esperanto. Tio okazis 1968 en Madrido: la instruista kunveno nomis min vicprezidanto de ILEI. Estas nun la 14-a jaro de nia komuna klopodado!

Kiu estas nun Mario Dazzini kies nomo estas identa kun Esperanto?

Li naskiĝis en Pietrasanta (Lucca) la 16-an de Julio en 1910. Jam en 1934 li doktoriĝis pri juro ĉe la universitato de Firenze. Jam kvin jaroj antaŭe li demonstris sian talenton por muziko: La juna Mario Dazzini diplomitiĝis pri fortopiano en la Akademio de Bologna (1929).

1952 li estis nomita profesoro pri ekonomio kaj beletro kaj instruis en italaj industriaj lernejoj.

Li studis kaj ankaŭ diplomitiĝis en pluraj lingvoj: germana, angla kaj franca lingvoj.

Ĉar nur malmultaj homoj lernas denaske Esperanton, estas ĝenerale interese scii pro kiaj kaŭzoj kaj motivoj ĉiu de ni lernis la lingvon.

Mario Dazzini nur hazarde konatiĝis kun Esperanto. Estis Novembro de la jaro 1931. Li promenadis kun Adolf Attinger- poŝtoficisto el Svislando/ Richterswill laŭlonge de la rivero Arno en Firenze. Li aŭdis je la unuafojo de li la vorton Esperanto.

La Internacia Lingvo fariĝis lingvo de interŝanĝo, ĉar M. Dazzini lernis la germanan de A. Attinger kaj li la italan lingvon de M. Dazzini, kaj ĉio je samtempa instruado kaj lernado de la Internacia Lingvo.

Certe estas por ĉiu «novbakita» Esperantisto aparta ektravivaĵo ricevi leteron, skribitan en Esperanto el lando kies lingvon li ne konas.

De Mario Dazzini ekzistas multege da leteroj, eble estus interesa la unua al la plumamiko s-ro Punti el Barcelono. Tamen- dum multaj jaroj li ne kuraĝis ek-

starigi personajn kontaktojn aŭ viziti konferencojn aŭ kongresojn. Sed post kiam esperantiĝis (1953) lia fratino Catina ekkomenciĝis la esperantista/internacia vivo de Mario Dazzini.

Li partoprenis la 25-an nacian kongreson en Como.

Rapide disvastiĝis la nomo de M. Dazzini inter la Esperantistoj en Italio. Ĉiun jaron li ne nur vizitis ĉiun nacian kongreson (la lastan 1981 en Romo) sed ankaŭ progreseme formis ilin: krom dekojn da kunvenoj li organizis la 27-an kongreson italan en Massa (1956), la 37-an (1966) en Carrara kaj la 47-an en Massa en la jaro 1976.

Kvin jarojn li estis vicprezidanto de la Itala Esperanto-Federacio, ekde tri jaroj ĝia sia prezidanto. Fidele Mario Dazzini deĵoris dek jarojn de UEA kiel ĉefdelegito- ne plu post Hamburgo.

La unuan Universalan Kongreson li vizitis en Harlema: en 1954 la 39-an kongreson de UEA. Li ne ĉeestis en Tokio, Varna kaj Brazilia, sed partoprenis ĉiujn aliajn.

Mario Dazzini membriĝis al ILEI en 1963 kaj partoprenis saman jaron la unuan konferencon de ILEI en Beogrado kaj ekde 1966 li estas en la ĝenerala sekretario.

Evoluo kaj progreso de ILEI estas ligitaj kun li.

Kio distingas la laboron de Mario Dazzini de ofte nur kondicionaloj eksplikoj, estas lia konkreta, konstanta kaj celkonscia laboro.

Li amas Esperanton kaj kuraĝe li defendas la lingvon kontraŭ ignoradon kaj diskriminacion.

Ĉiam li avertas, ke Esperanto sen instruado en la lernejoj restos nur alpendaĵo de la socio.

Konvinki instruistojn, esperantigi ilin, fondi kaj fortigi sekciojn, enkonduki Esperanton en la lernejojn pere de lernejoj eksperimentoj estas liaj gvidlinioj.

Kiom da Esperantistoj konas Mario Dazzini? Li posedas longan adresaron kaj facile li nomas homojn el ĉiuj partoj de la mondo. Kvankam ankoraŭ pli da Esperantistoj konas Marion Dazzini, certe nur malmultaj scias pri granda distingo: Li fariĝis Membro de la Akademio de la Muzoj. Ĉe la solena akcepto en la Salonego de la 500 en Palazzo Vecchio de Firenze li prezentis «Dante en Esperanto».

Tio okazis antaŭ 4 jaroj.

La teorio de lingvoinstruado

Unua parto

de István Szerdahelyi

Enkonduko

La lingvoscienco kaj ĝiaj modeloj

La moderna lingvistiko celas esti la ekzakta scienca modela de la parolakto.

La ĝenerala lingvistiko okupiĝas pri la difino kaj esploro de unuopaj «gramatikoj» (konceptoj), fiksas la universalajn regulojn kaj komunajn kategorioklasojn, eblajn por ĉiuj (aŭ plejmulto da) lingvoj.

La lingvistikaj modeloj estas klasigeblaj laŭ diverskarakteraj opozicioj:

A. *Modeloj analiza sinteza*

La analiza modelo eliras el la teksto kaj esploras (diserigas) ĝian konstruon, mekanismon;

La sinteza modelo eliras el la gramatiko, respektive el leksiko kaj perhelpe de gramatikaj reguloj (aŭtomato) konstruas tekston.

(La plej moderna sinteza modelo, la genera gramatiko strebas esti la dinamika modelo de la lingva funkciado, kiu samtempe kapablas modeligi kaj la akton de la informanto, kaj tiun de la informato.).

B. *modeloj kvalitiva kvantiva*

La kvalitiva modelo priskribas la abstraktajn rilatojn de la lingva mekanismo, esprimante ilin per algebraj kaj formal-logikaj aparatoj;

la kvantiva modelo esprimas la karakterizilojn de la tekstokorpo kaj ties elementoj, per statistikaj indikoj.

C. *modeloj parolo skribo*

D. *modeloj lingvo parolo*

E. *ĝenerala lingvistiko speciala lingvistiko*

F. *ĝenerala lingvistiko aplikata lingvistiko*

La aplikata lingvistiko celas solvi diverskarakterajn sociajn taskojn, solveblajn per lingvistikaj rimedoj. Tiaj taskoj povas esti ekz.: dokumentado, telekomunikado, kulturinterŝanĝo, interlingvistiko, instruado de lingvoj ktp.

En la aplikata lingvistiko estas distingeblaj du opozicioj:

a *modelo unulingva heterolingva*

La diferencigo dependas de tio, ĉu la tasko estas solvebla en la kadroj de unu lingvo, aŭ de du, aŭ de pluraj linvoj. Dulingva tasko estas ekz. tiuj de interlingvistiko, la tradukado, la instruado de fremdaj lingvoj.

b *maŝina humana*

La branĉo de la aplikata lingvistiko, kiu konstruas la maŝin-interlingvojn («komputera lingvistiko»), respektive la lingvoinstruado, estas du tipaj ekzemploj por tiuj opozici-paro¹.

Guste en tiu ĉi lasta opozicio okazas en niaj tempoj la plej oftaj pruntoj: la metodologio de la fremda-lingva instruado ĉiam pli kaj pli klopodas fruktuzi la ekzakteccon kaj la teknikon de la komputera lingvistiko.

Konklude: la instruado de fremdaj lingvoj kaj ĝia metodologio estas branĉo de la aplikata lingvistiko, apartenanta al ĝia humana kategorio kaj heterolingva modelo. La scienca branĉo, kiu studas kaj esploras la humanajn-heterolingvajn fenomenojn, nomiĝas *kontaktologio*.

La *kontaktologio* estas tiu scienca disciplino, kiu okupiĝas pri la lingvaj kontaktoj:

Laŭ Weinreich² «...du aŭ pluraj lingvoj estas konsiderendaj kiel kontaktantaj, se ili estas uzataj alterne far de la samaj individuoj.». Laŭ Haugen³: «La lingva kontakto estas la alterna uzado de du aŭ pluraj lingvoj far de la samaj personoj.».

La kontakto de du lingvoj nomiĝas *bilingvismo*. La bilingvismo povas esti duspeca: se la lingvouzanto uzas unu lingvon nur en certaj situacioj, kaj la duan en alia situacio (ekz. hejme, respektive en la lernejo), temas pri pura bilingvismo. En tiu kazo la du mekanismoj aŭtomate interŝanĝiĝas, la bilingvismo nomiĝas miksita; *formale*: se la persono *A*, kies gepatra lingvo estas *a* kaj regas samnivele la lingvon *b*, kontaktiĝas kun la persono *B*, kies gepatra lingvo estas *b* sed regas samnivele la lingvon *a*, ekestas la rilato:

$$A_{ab} \leftrightarrow B_{ba}$$

La kontaktologio studas ankaŭ tiujn situaciojn, kiam pro la manko de komuna lingvo (kodo) ne estiĝas inform-interŝanĝo:

$$A_a \leftrightarrow B_b$$

Fine — ĝi studas ankaŭ la solvon de tiu problemo, kiam *A_a* kaj *B_b* klopodas havi iun komunan kodon, kiu povas esti:

$$\text{aŭ } a: \quad A_a \leftrightarrow B_{ba}$$

$$\text{aŭ } b: \quad A_{ab} \leftrightarrow B_b$$

aŭ iu tria lingvo, kiu povas esti *c*, t.e. la gepatra lingvo de *C*:

$$A_{ac} \leftrightarrow B_{bc}$$

aŭ iu interlingvo — en nia kazo Esperanto: *e*:

$$A_{ae} \leftrightarrow B_{be}$$

Laŭ tiu skemo evidentiĝas, ke kaj la interlingvistiko, kaj la esperantologio apartenas al la kontaktologio. Ĉar la interlingvo (Esperanto) estas ĉiam fremda lingvo (ni ne konsideras la maloftan kaj esceptan kazon de t.n. «denaskaj esperantistoj»), la lernado kaj alproprigo de Esperanto apartenas ĉiam al la problemaro de fremda-lingva instruado.

La kontaktologio, solvante la supre priskribitajn taskojn, studas ankaŭ tiujn fenomenojn, kiuj rezultas el la konflikto de la kontaktiĝantaj lingvoj (interfero, integriĝo, pruntado, adaptado, asimilado, substituo); la reciprokajn leksikan, fonologian kaj gramatikan influojn (etnonimoj, barbarismoj, makaronismoj, interonomoj, hibridiĝo, kreoliĝo, pidĝiniĝo...), la problemojn de la tradukado kaj interpretado, ktp.

Tiu ĉi vastaskala problemaro ne estas homogena: ĝi ne apartenas nur al unu scienco, sed tuŝas tri diversajn sciencojn: la lingvistikon, la psikologion kaj la sociologion⁴.

Sekve, la kontaktologio estas interscienca branĉo, lingvocentra sed samtempe sinteziganta tiujn psikologiajn kaj sociologiajn elementojn, kiuj koncernas la konkretan aspekton de la studata objekto, en nia kazo, de la metodologio de fremdaj lingvoj ĝenerale, kaj tiu de Esperanto speciale⁵.

daŭrigota

Sonnabend

lerneja
eksperimento

kajeroj
de
Internacia
Pedagogia
Revuo

Helmut Sonnabend

**Esperanto:
lerneja eksperimento**

- raporto
- analizo
- konkludo

157 paĝoj
sciencnivele
prilaboritaj
flulegeblaj
kaj kaptaj
kiel romano

12 gld.

Edistudio, 1981
c.p. 213 I-56100 Pisa

Edistudio, 1979

La stato kaj la tendencoj de la aplikado de Esperanto en la sciencoj kaj fakoj en majo 1981

de Ottó Haszpra

Estimata Kolegaro!

En mia hodiaŭa prelego mi volus paroli pri temo, kiu egale devas interesi ĉiujn fakulojn, kiuj devas peri informojn al aŭ el alinaciaj medioj.

Ekzistantaj problemoj

Pri la problemoj de la lingva komunikado, kvankam mi povus paroli horojn, tamen la esenco estas ke la ekzistantaj solvometodoj parte estas ege multekostaj, parte nekontentigaj.

Kiuj estas la metodoj? Praktike du metodoj ekzistas, same kiel antaŭ kvinmil jaroj: uzo de iu elektita nacia lingvo, kiu multfoje estas tiu de unu el la partioj, aŭ uzo de interpretistoj aŭ tradukistoj. La unua metodo postulas ke la fakuloj bone, eĉ eminente, regu la elektitan lingvon, la alia, ke la tradukantoj bone konu la fakon. Tre trafe konstatis sur la paĝoj de Világ és Nyelv la komputisto Mandler György, ke oni komprenas kion la alia partnero diras, se oni jam antaŭe iom scietas, kion li volas diri. Se la informo estas kompleta novaĵo, la kompreno ofte fiaskas. Mi mem havis tiajn spertojn dum la cehoslovakaj — hungaraj fakaj traktadoj pri la preparata akvonodo-sistemo Gabcikavo-Nagymaros. Tie ĉiuj ĝeneralajoj tre bele estas interpretataj. Sed se temas pri sciencaj detaloj, la nefakaj interpretistoj, kaj eĉ la rekta uzo de pluraj mondlingvoj, povas fiaski aŭ almenaŭ tre longa tempo estas bezonata por la klarigo, aŭ oni simple kredas ke la solvo estas bona, aŭ oni konsideras, ke la afero ne estas tiel grava, ke oni malŝparu tempon por klarigo, do oni post la nesukcesaj provoj simple rezignas pri la postulo klarigi perfekte la aferon.

Cetero mi vidis tekston de interŝtata kontrakto, subskribitan de la koncernaj ministroj, en kiu la hungara flanko promesis sendi dialektikajn ilojn por ekipi estigotan faklernejon en Alĝerio. Almenaŭ tio estis en la hungara teksto, kiu kune kun la araba, estis deklarita oficiala. Estis ne oficiala franca teksto, en kiu menciigis *didaktikaj* iloj. Mi ne scias, kio estis en la araba teksto.

Eble indas mencii ion pri la *kostoj* de la internacia komunikado. Fakte, pri tio ankoraŭ neniu faris vere ĝeneralan statistikon. Se oni parolas pri la kostoj, tio ĉiam

koncernas la senperajn kostojn, tiun de la tradukado-interpretado. Do se la koncernaj fakuloj konas la lingvon de la traktado, tiam oni konsideras, ke la lingvo ne kaŭzas kostojn.

Tradukado, interpretado eĉ en si mem signifas altajn kostojn, ne parolante pri la organiza kaj munta laboro kiam oni provizas konferencejojn per elektronika helpaparato por simultana tradukado. Esperantistoj povas legi en la revuo Esperanto, ke la porlingvaj elspezoj de la Unuiĝintaj Nacioj superas 100 milionojn da dolaroj jare. Terure! — diras la esperantistoj. Tamen tiu centmiliono sumo, kiu por hungara laborulo signifas unu aŭ du forintojn jare, tute ne instigas la registarojn ŝanĝi la situacion per la ekuzado de unu komuna lingvo.

Tamen mi devas diri, ke la vera kosto de la multlingveco estas ne en la senperaj kostoj de la tradukado. La veran koston signifas la tempokonsumo de la lernado de la lingvoj. Averaĝe inteligenta persono kutime devas dediĉi 2000 horojn, do tutan laborjaron al la lernado de fremda lingvo, ne parolante pri la stabiligo de la akirita scio. Se oni konsideras pro simpleco, ke la laborperiodo de la vivo daŭras 40 jarojn, tio signifas, ke el tiu periodo 2,5 procentoj estas dediĉitaj al lernado de unu lingvo. Mi opinias ke en la malproksima estonto ĉiu homo devus scii komunan lingvon krom sia gepatra, pere de kiu li aŭ ŝi povas interkompreniĝi kun iu ajn loĝanto de la tero. Se tiu komuna lingvo estus nacia lingvo, la produktado de la homaro estus 2,5 procentoj pli malalta ol se oni ne perdus tempon per la lernado de dua lingvo. Sed se oni elektus Esperanton, por kies ellerno, laŭ mia propra sperto, 200 horoj estas abunde sufiĉaj, tiam la tempoperdo, t.e. la produkto perdo egalus nur 0,25 procentojn. Kaj se la tiel liberiĝantan tempon oni ne volas uzi por industrie produkti, oni povus ekzemple plilongigi ĉies jaran libertempon per 4... 5 tagoj ĉiujare.

Mi nur menciu ke la ellernado de fremda nacia lingvo fare de la tuta homaro (escepte la privilegiitan nacian) signifus produkto perdon egalvaloran al 1000 miliardoj da dolaroj, kiu sumo egalas la nunan tutan nacian enspezon de Usono, kaj ĉirkaŭ trioblon de la militelspezoj de la nuna mondo. Eĉ nuntempe oni povas kalkuli ke la lernado de lingvoj far limigita nombro da homoj kostas ĉ. 10 miliardojn da dolaroj tutmonde, kiu jam tute ne estas neglektebla sumo. Ĉio ĉi simple pro la neestigitaj produktaĵoj.

La avantaĝoj de Esperanto

Tiom pri la problemoj kaj la kostoj pri la nuna lingva interkomunikado. Do, estas absolute evidente, ke se ni havas lingvon kiu diskonigus la kostojn de la lernado, tiu kvociento 1:10 jam en si mem estas tiel okulfrapa, ke neniu alia eksplikado pri la utileco de Esperanto estas necesa.

Unu tamen estas necesa! Respondi ĉu Esperanto vere kapablas plenumi la taskojn kiujn la socio starigas kontraŭ ĉiu alte kulturita lingvo. Se jes, oni povas jam kontraŭjeti nenian racian argumenton kontraŭ la tutmonda enkonduko de Esperanto. Mi ripetas: racian! Ĉar malraciaj argumentoj nepre svarmas kaj svarmos kaj oni devos tuforte lukti por venki la kaŝintencojn malraciulojn.

Nu, ĉu vere Esperanto estas taŭga por esti lingvo de la hodiaŭa kaj morgaŭa alte

evoluinta socio? Ĉu ĝi kapablas esprimi ĉion, ekzemple en la tereno de la sciencoj? Tio estas la demando.

Ni devas konfesi, ke dum la naŭdekjara vivo de nia internacia lingvo oni preskaŭ ĉiam emfazis nur ke ĝi estas taŭga por beletro, poemoj, dramoj, noveloj ktp. Kaj oni pleje fieris — rajte — pri kelkaj vere artaj kaj altnivelaj literaturaj kreaĵoj de Esperantaj poetoj, verkistoj, beletristoj.

Tamen pri la bezonoj de la ĉiutaga, sed samtempe altnivela, faka interkomunikado la progreso estis tre malrapida, kaj ties direktado ne ĉiam estis en la plej taŭgaj manoj.

Sekve, kvankam por du samfakuloj, kiuj bone scias Esperanton, estas relative facile interŝanĝi fakajn ideojn per momente konstruitaj esprimoj kaj ĉirkaŭ-skriboj, tamen ni ne povas paroli pri alte evoluinta unueca Esperanta faklingvo, kaj same la scienca literaturo kaj la nombro de scienco-celaj konferencoj estas malgranda. almenaŭ tio estis la situacio ĝis antaŭ kelkaj jaroj. Tiam ŝajnas, la afero komencis grave ŝanĝiĝi.

En la sekvaj notoj mi simple listigos kaj iom komentos kelkajn eventojn, kiuj montras la novan sintenon de la Esperanta socio rilate al la scienca aplikado de nia lingvo

Sciencodirekta evoluo ene de la Esperanto-movado

Enkonduke mi emfazu nur tion, ke kvankam Esperanto ankoraŭ ne havas sistemitan, ĝenerale akceptitan sciencon terminologion, tamen en tiuj sciencoj aŭ subbranĉoj de sciencoj, kie oni serioze uzis Esperanton, montriĝis ke ekzistas nenia obstaklo kontraŭ evoluigi ĝin en veran sciencon lingvon. Rajte konstatis la Ahrenshoop interlingvistika seminario en GDR en 1978:

«La ĝisnunaj spertoj kaj faktoj pruvas ke Esperanto estas plej taŭga kiel interlingvo ankaŭ por la scienco»¹³.

Fakte, interne de la Esperanto-movado jam Zamenhof mem pensis pri la scienca aplikado de Esperanto, ja ni trovas en lia Fundamenta Krestomatio oftalmologian, astronomian kaj aliajn meznivelajn sciencajn tekstojn.

Komence de nia jarcento esperantistaj sciencistoj, eĉ grandreputaciaj, komencis iom vikle agadi, sed post pluraj haltoj kaj restartoj (ĉefe pro la du mondmilitoj) ŝajnas, ke nur dum la lasta jardeko komenciĝis agado vere altnivela, kaj en iom pli bone organizita formo ol antaŭe, en la tereno de la sciencoj.

Jen iom rapsodie pri la aranĝaĵoj, organoj kaj eventoj, kiuj ŝajne pleje influis kaj influas nuntempe la porsciencan aplikadon de nia lingvo en la mondo.

Eble la plej grava, ĉar siaspece unua kaj direktomontra, estis la *Interlingvistika seminario, Ahrenshoop, GDR, 1978*. Kvankam izolitaj provoj, eĉ persistaj kaj ĝis hodiaŭ daŭraj — kiel la Sciencaj Vesperoj en Budapeŝto — komenciĝis jam iom antaŭe, tamen tiu seminario estis la unua kunveno de plurnacia serioza fakularo, kiu sisteme okupiĝis pri la sciencaj taskoj koncernantaj la studadon de la internacia lingvo kaj pri la taskoj por ties scienca aplikado. La ĉeestintaj lingvaj kaj natursciencaj fakuloj konstatis la neceson «disvastigi la aplikon de Esperanto je ĉiam pli

multaj sciencaj kaj fakaj terenoj... (kaj) ...kreskigi la proporcion de ĝia utiligo». La Komunikado pri la Seminario donis gravan puŝon al la organizado de esperantlingvaj natursciencaj konferencoj kaj aliaj agadoj. Kvankam la interlingvistika scienca agado en GDR jam komenciĝis kelkajn jarojn antaŭe, kaj sub ties efiko kaj pro la celkonscia iniciato de la GDR-a delegito Dr. Blanke, eĉ la antaŭaj Konsultiĝoj de la gvidantoj de la socialism-landaj Esperanto-organizaĵoj jam akceptis kelkajn rekomendojn koncerne la sciencon studadon de Esperanto kaj de ties sociaj rilatoj, tamen — miaopinie — estis ĝuste la teoriaj diskutoj pri la estontaj farenadoj en tiu seminario, kiuj donis la fundamenton de tiuj tre detalaj kaj praktikaj rekomendoj pri la scienca aplikado de Esperanto, kiujn la sekva, 12-a, Konsultiĝo akceptis en 1979, kaj kiuj lastaj povas servi por longa tempo kiel direktivoj por ĉiuj sciencocelaj agadoj, mia opinie ne nur en la socialismaj landoj, sed ankaŭ en la tuta Esperanta mondo. Interterpe la materialo de la seminario aperis en aparta volumo¹³

Seminario: apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, Zilina, Ĉeĥoslovakio, 1978. Ĝi jam grandparte okupiĝis pri la aplikado de Esperanto en la natursciencoj kaj tekniko, kaj la sukceso (ĉ. 60 partoprenintoj) instigis organizi kaj plani pluajn en Ĉeĥoslovakio kaj en aliaj landoj. La materialo de la prelegoj aperis en aparta volumo.

Samtitola seminario, Usti nad Labem, Ĉeĥoslovakio, 1980. Tiu ĉi seminario organizita en la ĉeĥa respubliko de CS same okupiĝis pri faklingvaj demandoj kaj pri natursciencaj temoj, tamen ĉi lastaj ĉiuj rilatis al la biosfero aŭ al la homa vivmedio.

Partopreniteco estis iom pli granda: ĉ. 80 fakuloj, inter ili kun dekduo da eksterlandanoj, signifis konsiderindan antaŭenpason.

Medicinaj konferencoj, Krakovo, PL 1978 kaj Hódmez, H, 1979. Precipe la lasta prezentis altnivelan sciencon programon. la Krakova materialo aperis presita, la alia aperos baldaŭ en la Sciencaj Komunikadoj. Cetere ĉijare Medicina Konferenco okazos en Ruse, Bulgario.

Sciencaj Vesperoj en klubo Konkordo, Budapeŝto, H, ekde 1972 regule aranĝiĝas dufoje monate kun hungaraj kaj eksterlandaj prelegantoj, plejparte pri natursciencaj kaj teknikaj temoj. La nombro de la Vesperoj jam proksimiĝas al 150 (naŭ jaroj!).

La Budapeŝta Informilo ĉiumonate enhavas 4-8 paĝan *Sciencon Rubrikon* kaj ĉiujare aperigas aldonkajeron *Sciencaj Komunikadoj* kun sciencaj kaj popularsciencaj artikoloj kaj informaj kaj direktomontraj skribaĵoj.

Nepre menciindas la *ĉiujara granda scienca vespero de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo* kie ankaŭ provincoj kaj eksterlandanoj prelegas kaj diskutas ekde 1973.

Nuntempe apartaj *komputista, veterinara kaj medicinistaj grupoj* komencas memstare agadi en Hungarujo. Precipe la komputista grupo (en la klubo Konkordo) agadas tre aktive. Eble vi vidis la plej lastan numeron de la neregule aperanta *Interfako*.

Latinamerika scienca konferenco, Marilia, Brazilo, 1979. Ŝajnas, ke scienca

agado reviviĝas en tiu kontinento.

Organiziĝo de sciencistoj-inĝenieroj kun energia gvidado sed ankoraŭ malforta membraro komenciĝis en *Usono*. Ankaŭ tie ni komencas vidi formiĝon de korespondaj kursoj pri diversaj sciencoj en la Universitato Comenius, en Kalifornio.

Forte agadas la komuna *Terminologia Centro de la Internacia Sciencia Asocio Esperantista* kaj de la *Akademio de Esperanto* en Kanado. Nur antaŭ kelkaj monatoj ĝi aperigis la proveldonon de la Duden Bildvortaro, kiun mi rekomendas al ĉies atento.

Organiziĝo de la *sciencaj komisionoj ĉe preskaŭ ĉiuj socialism-landaj Eŭropaj-Esperanto-Asocioj, inkluzive Sovetion*, krome la fakto, ke la nova *Kuba Esperanto-Asocio rekte apartenas al la Kuba Sciencia Akademio*, ofertas plurajn eblecojn ankoraŭ ne tute ekspluatatajn por pli efika disvolvo de la sciencia aplikado de Esperanto. Estas ankoraŭ malhelpoj pro inerto kaj miskomprenemo de certaj oficialuloj, tamen la perspektivoj vastiĝis. Estas verŝajne, ke per helpo de unu al alia, en la tre proksima estonteco la natur-sciencia kaj teknika aplikado de Esperanto estos orgnizite kultivata ankaŭ en GDR, Bulgario, kaj Pollando.

En la *Tria Mondo*, ĉefe en *Irano*, ekde kelkaj jaroj la lingvo disvastiĝas ĉefe en *universitataj rondoj progresemaĵ* kaj oni metas la emfazon al la *sciencia-teknika aplikado*. Eĉ inter la nunaj cirkonstancoj foje foje alvenas bonaj novaĵoj pri tio.

Ŝajne en la lastaj unu-du jaroj la forta centra direktado de la *Esperanto-Ligo en Ĉinio* iom mildiĝis, eminentaj esperantistoj liberiĝis el la prizono, kaj krom la plurloka reflorado de la Esperanto-movado anoncis sin *ankaŭ sciencistoj* kiuj pleje emfazas la gravecon de la sciencia aplikado de Esperanto¹⁴. La El Popola Ĉinio serie publikigas popularsciencajn kaj teknikajn artikolojn kaj startis jam eĉ sciencia revuo (Entomotaxonomia) en kiu interalie ankaŭ Esperanto estas uzata. Aperis la unua sciencia libro enhavanta 17-paĝan Esperantan resumon kaj ankaŭ la Plenan Gramatikon de Kalocsay kaj Waringhien UEA sukcesis presigi en Ĉinujo.

En *Rumanio* la movado ĵus reviviĝis kaj forte evoluas en universitataj kaj akademiamaj rondoj. Oni jam aranĝis plurajn *sciencajn tagojn* en Timisoara kaj oni aperigos la unuan numeron de literatursciencia revuo.

Rapida evoluo okazas en *Sovetio*, kie jam antaŭe la *Interlingvistika grupo de la Sciencia Akademio de SU* produktis gravajn sciencajn materialojn pri la aplikado de Esperanto¹, dum nun estas eldonata la dua studvolumo pri la problemoj de la internacia helplingvo². Organiziĝis ankaŭ *alia sciencia grupo ĉe la Kibernetika Komitato de la Prezidio de la Sciencia Akademio de SU* pri «Planaj lingvoj ka dokumentoj». Oni nun diskutas pri celdifinoj kaj klopodas atingi apereblecon por Esperanto-lingva revuo, kiu verŝajne havos ankaŭ ian sciencan suplementon. Tamen tiu afero ankoraŭ ne estas solvita.

Fine de 1980 kaj komence de 1981 fondiĝis pluraj sciencaj grupoj en la lando. La Leningrada grupo en aprilo aranĝis sian unuan sciencan prelegkunvenon kaj anoncis sciencan seminarion-programon por 1981.

Pri kibernetiko oni okupiĝas ankaŭ okcidente, ĉefe en la *Instituto por Kibernetiko en Paderborn, FRG*, kiu faras organizan laboron eĉ atingis ke unu el la oficialaj

lingvoj de la Internacia Kongreso de Kibernetiko aranĝita en Namur, Belgio, 1980, estu Esperanto apud la gisnunaj angla kaj franca.

En la *Someraj Universitataj Kursoj* en Lieĝe, Belgio, de pluraj jaroj oni aranĝas *plursemajnajn sciencajn prelegseriojn* kaj eldonas ties materialon en formo de notoj. Cetere tre multekoste, kaj miaopinie tio estas obstaklo kontraŭ pli rapida evoluo. Nu, tiuj notoj signifparte aperis el la plumo de japanaj sciencistoj, ja en *Japanujo multaj sciencistoj, ankaŭ junuloj, favoras Esperanton, aperigas librojn*.

Surbaze de la numeroj de La Espero el Koreujo oni povas konstati ke ankaŭ en *Suda Koreujo* oni dediĉas atenton al sciencia kaj teknika aplikado de nia lingvo. Instruado de la lingvo Esperanto enpenetris iome eĉ en teknikajn universitatojn.

En *Vjetnamio* dum la liberiga milito oni relative multe eldonis en Esperanto, inter ili ankaŭ *popularsciencajn librojn* pri la popoloj, geografio, historio, ekonomio de Vjetnamio. Espereblas, ke nun dum la jaroj de la landkonstruado oni plu utiligos Esperanton helpante ĝian disvastigon ankaŭ en Laoso kaj Kampuĉio.

Oni devas konsideri grava evento, ke la *Kemia Fakultato de la Varsovia Teknika Universitato* aranĝis en aprilo, 1980 renkontiĝon de la estintaj studentoj, kies slogano estis «*Esperanto ĉe la scienco kaj tekniko*». En ĝia sciencia sesio, inter aliaj sciencaj prelegoj, 200 personoj aŭskultis pollingvan informprelegon pri Esperanto kaj poste esperantlingvan teknikajn prelegon de eksterlanda profesoro, kiu vekis tre grandan interesiĝon. Fakte tiu eksterlanda profesoro estis mi. Cetere tion mi ripetis ankaŭ en Sofio por tute faka aŭskultantaro el 8 profesoroj kaj 50 studentoj, sed ĉikaze kun interpretado de frazo al frazo. Poste mi respondis kaj diskutis alparolojn, kio montris ke Esperanto estas vere viva lingvo, kapabla esprimi eĉ sciencajojn. Cetere tia specaj prelegoj estas laŭ mia opinio, unu el la plej efikaj metodoj por la enpenetrado en esperantistajn mediojn.

Ioma aktivado komenciĝis inter studentaro kaj profesorado de ankaŭ *alilandaj teknikaj universitatoj* (hungara, nederlanda, slovaka, sovetia), kaj ankaŭ la *Junulara Esperanto-Renkontiĝo de HEJ* Tata, 1980, Hungario, aranĝis prelegvesperon de la Budapesta Teknika Universitato pri teknika temo.

Pri la sinteno de la neesperantista sciencia mondo

La ekstermovadaj sciencaj rondoj ĝis la plej lastaj tempoj eĉ ne rimarkis la ekziston de la sciencia aplikado de Esperanto. Pri la lingva problemoj mem jam delonge oni pli malpli konsciĝis, sed koncerne la solvon nenia sciencia instanco emis eĉ nur menciin la aplikeblecon de Esperanto.

Estas fenomeno de la lastaj jaroj, ke kelkaj neesperantistaj organizaĵoj kaj publikaĵoj komencis trakti la aplikeblecon de Esperanto serioze. Tio speguliĝas en la nacilingva sciencia literaturo. Krom la jam menciitaj sovetiaj akademiamaj eldonaĵoj — kiuj tamen plej parte, kvankam ne ekskluzive, estis verkitaj de lingvistoj — mi menciin tiajn skribaĵojn kiuj aperis en natursciencaj kaj teknikaj publikaĵoj.

En 1977 en la amerika Water Resources Bulletin aperis artikolo pri la obstakloj kaŭzita de multlingveco en la utiligado de akvoresursoj, montranta Esperanton kiel perfektan solvon¹⁵. Samjare en la hungara geodezia revuo Földmérő aperis detala

konigo de la aplikeblecoj de Esperanto⁴. En 1978 aperis soveta studaro pri la scienca kaj teknika revolucio kaj la funkcionado de mondlingvoj kun favora artikolo ankaŭ pri Esperanto¹². Aperis pri Esperanto koniga artikolo en la revuo *Information Processing and Management*⁶, artikolserio en la *computer Weekly*, diskuto en la gazeto de la nederlanda Delfta Teknika Universitato. En 1979 en seria eldonado de ĉeĥa pedagogia atlernejo aperis studo pri informadiko kaj internacia lingvo en la epoko de la scienca-teknika revolucio⁷. En *Physics Today* aperis oni prezentis la avantaĝojn de la uzo de Esperanto en internaciaj konferencoj kaj kursoj pri fiziko¹⁰. Kelkaj neesperantistaj organizaĵoj eldonadas Esperante. Ekz. la Unuiĝintaj Nacioj aperigis la Ĉarton de UN kaj la Statuton de la Internacia Kortumo¹⁷. La Federacio de Sciencaj Laboristoj aperigas sian organon ankaŭ Esperante¹⁸.

Speciala fenomeno ke dum la lastaj jaroj eldonistoj de fakvortaroj komencas enlasi ankaŭ Esperanton inter la prezentitaj lingvoj. Ekzistas pluraj hungarlandaj ekzemploj, tamen mi menciis nur la naŭlingvan ekonomian vortaron eldonitan de la nederlanda Kluwer⁵, kaj kiel plej lastan la terminaron pri peltindustrio aperintan en la ĉeĥoslovaka normoserio trilingve (ĉeĥa-angla-Esperanta)¹⁵. Nun ni laboras pri kontrakto kun la Hungara Naturprotekta Ministerio en kiu eble eldono de medio-protekta fakvortaro estos envolvita.

Eble ĉi tie mi menciis unuafoje okazintan kolektivan fakan-politikan enpenetrado de esperantistoj en okcidento en la ŝtatan vivon: En Nederlando en aprilo 1981 la Nederlanda Esperanto-Kongreso pritraktis la energipolitikon de sia lando, aperigis pri tio popularsciencnivelan broŝuron¹⁶ kaj invitis la reprezentantojn de la politikaj partioj serioze pridiskuti la aferon kun ili.

Fine — kvankam eble tio estis plej antaŭlonge spertebla fenomeno koncerne la aplikadon de nia lingvo fare de neesperantistaj organoj — jam multajn ekzemplojn oni povas citi pri la aplikado de Esperanto kiel resumlingvon en fakaj periodaĵoj. Plej interesa el ili estas eble la ĉeĥoslovaka statistika bulteno, kiu prezentas la ĝeneralajn statistikajn tabelojn ĉiam esperantlingve¹¹.

Pri la planoj de la Esperanto movado koncerne la sciencan kaj fakan aplikadon

La Esperanto-socio ankoraŭ ne estas tro planema homarero. Do ni ne multe scias kion oni planas por antaŭenigi la sciencan aplikadon de la lingvo. Tamen estas certe, ke la ĉi supre skizitaj iniciatoj plu disvolviĝos.

En 1981 certe havos konsiderindajn rezultojn la scienca-teknika konferenco de la slovakoj en Zilina, ja ili povas jam bazi sin sur la spertojn de la du similaj kunvenoj en Ĉeĥoslovakio.

Esperable ankaŭ la Somera Esperanto-Universitato en Gyula havos pli grandan sukceson ol lastjare, kaj al tio certe kontribuos la grupkunvenoj aŭ seminarioj organizotaj pri kelkaj temoj por fakuloj.

Ŝajne la plej grava kaj plej lasta evento estas ke UEA kaj HEA antaŭ du monatoj subskribis kontrakton pri la fondo de la budapeŝta oficejo de UEA kies ĉefa tasko estos eldono de natursciencaj kaj teknikaj libroj, tiu de la Sciencaj Komunikaĵoj kaj ĝi disvolvos ankaŭ aliajn agadojn en la scienca kampo.

Fine, kvankam mi jam menciis ekzemplojn pri la enpenetrado en la neesperantistajn mediojn, mi ankoraŭ mencias tri. En Hungario en la gazeto de la Budapeŝta Teknika Universitato ĉijare ni komencis aperigi artikolojn pri Esperanto kaj ties eblecoj en la faka interkomunikado. Nun ni sendis la unuan artikolon pri Esperanto al la centra organo de la Unio de la Sciencaj kaj Teknikaj Asocioj. La tria enpenetro okazos en urbo Svistov, Bulgario en junio, kie Esperanto aktivuloj sukcesis atingi, ke apud la bulgara kaj rusa ankaŭ Esperanto estas preleglingvo kaj lingvo de la publikaĵo de la II-a Ekologia Konferenco.

Tio estas skize kaj nekomplete la nuntempa situacio pri la aplikado de Esperanto en la natursciencoj. Certe mi ne tuŝis ĉiujn aspektojn kaj atingajojn, kiel la bone informita aŭskultanto evidente rimarkis. Ekzemple mi ne parolis pri la sinteno de la Akademio de Esperanto, pri la situacio de la Esperanto-lingva scienca revuaro ktp., ktp.

Tamen ĉiu ĉi agado, ĉu menciita supre ĉu ne, estas tre salutinda. Ĝi evidente servas la pacon, ja la scienco mem devas servi la pacon en la manoj de konsciencaj homoj. Kaj la sciencistoj kaj teknikistoj kiuj laboras por la paco, nepre pli efike povas tion fari se ili uzas kaj disvolvas Espranton ankaŭ en siaj fakoj.

Selektita literaturo

- ¹ Akademija Nauk SSSR, Institut jazykoznanija: Problemy interlingvistiki. Tipologija i evolucija mejdunarodnyh iskusst vennyh jazykov. Nauka, Moskva, 1976.
- ² Isaev M.(red): Problemy mejdunarodnogo uspomagatelnoĝo jazyka. Nauka, Moskva, 1980.
- ³ Kent Jones, R. and Dale, John T.Jr.: Language Constraints to Water Pesources Utilization. *Water Resources Bulletin*, October 1977. pp. 1007-1019.
- ⁴ Haszpra Ottó: Az eszperanto a tudományos és szakmai életben. *Gondolatok a hatnyelvü geodéziai szakasztár megjelenése alkalmából. Földmérö* 1977/12.
- ⁵ Munniksma, F.: *International Business Dictionary in Nine Languages*. Kluwer, Deventer-Antwerp, 1975.
- ⁶ Kent Jones, R.: Language Utilization for Improved Information in Water Management. The necessity of Esperanto. *Information Processing and Management*, Vol. 14 pp. 363-368. Pergamon Press, 1978
- ⁷ Novobilsky, V.: Informatika a problém mezinárodního plánovaného jazyka V obodbi vědecko-technické revoluce. *Sbornik pedagogické fakulty V Usti nad Labem, řada chemická. Státni Pedagogické Nakladatelství, Praha*, 1979.
- ⁸ Stoberski, Z.: *International Scientific Terminology and Neologisme in the Course of Unification*, *Babel* 2/1979.
- ⁹ Haszpra, O.: *An Example of International Scientific Co-Operation*. *Scientific World* 2/1979.

- ¹⁰ Sherwood, B.A.: Universal Language Requirement. *Physics Today*, July, 1979.
- ¹¹ Demosta, Bulletin for Demography and Statistics, 3/1980. Eldonita de Federální Statistický Urad CSSR Inst. Demografie.
- ¹² Akademija Nauk SSSR. Institut jazykoznanija: naučno- tečniĉeskaja revolucija i funkcionirovanie jazykov mira. Nauka, Moskva, 1977.
- ¹³ Blanke D. (red): Esperanto. La internacia lingvo — sciencaj aspektoj. Zentralen Arbeitskreis Esperanto im Kulturbund der DDR, Berlin, 1979.
- ¹⁴ Ouyang Wendao: Lingva problemo en sciencoj kaj rolo de Esperanto. El Popola Ĉinio 1/1980.
- ¹⁵ On 79 8001: Naszvoslovi košešnickych strojů, zařizeni a naradi. Vydavatelství Uradu pro Normalizaci a Meřeni, Praha, 1980.
- ¹⁶ I. de Bruin-Kooij kaj A.S.F. de Wit: Energio. Federacio de Esperanto-Organizoj en Nederlando, Aprilo, 1981.
- ¹⁷ Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj Statuto de la Internacia Kortumo. Unuiĝintaj Nacioj, Oficejo de Publika Informado, Novjorko, 1980.
- ¹⁸ Scienca Mondo. Kvaronjara revuo de la Federacio de Sciencaj Laboristoj.

La intelekta evoluo de la infanoj

de Hans Gransee

El ĉi-tiu artikoloserio sekvas: Vivantaj aĵoj kaj fabeloj

Komence mi notas tri infanobservojn, kiuj laŭŝajne ne apartenas unu al la alia, kiuj tamen estas necesaj por kompreni la internan interligon de ĉi-tiu artikolo:

1. Anne (2 jaroj, 3 monatoj = 2/3): «Mi ne povas liberigi la fingron, kie ĝi estas algluita?» La avino: «La fingro ne estas algluita. La fingro estas *a/kreskinta* tute firme». Anne: «La fingro nun *dekresku!*»
2. Uli (2/6) vokis: «Krajonoj venu! Ili venu!» Kiam mi diris: «Ili ne havas piedojn.» tiam Uli opiniis: «Ili ja ruliĝas.»
3. Jena ekzemplo montras, ke Uli (0/11) iĝis pli racia: Ĝis antaŭ kvar semajnoj li prenis ĉiun atingitan pecon da papero kaj enŝovis ĝin en sian buŝon. Tiam alvenis la periodo, kiam li disŝiris ĉiun paperfolion en «mil» pecojn, sed li ne plu volis manĝi ilin. Intertempe Uli alrigardas unue ekzakte ĉiun pecon da papero, kaj tiam li turnas sin al iu alia okupiĝo.

Kiam Anne (2/3) postulas: «La Fingro estas firmigita, ĝi nun dekresku!», tiam ŝi

serĉas la eblecon ricevi solan la fingron, por tiel povi ludi per la fingro. La lingvo helpis ŝin, trovi eblecon al malgluo de la fingro. Kiel ŝi eksciis: «Oni povas *a/pendigi* la bildon; oni povas *dependigi* la bildon», tial ŝi postulas nun: «La tingro *dekresku!*» (ĉar la fingro ja estas *a/kreskinta*). Sed pli grava en ĉi-tiu infaneldiro estas la fakto, ke Anne ankoraŭ ne rigardas la fingron kiel membron de la korpo. Por ŝi ankoraŭ ĉiu aparta korpopeco estas propra individuo, propra vivaĵo.

Kaj tia propra vivaĵo povas esti por la preskaŭ samaĝa Uli ankaŭ krajono: «La krajono ja povas ruliĝi, do ĝi venu al mi!» Ĉi-tie la demando altrudiĝas: «Kiel okazas, ke ĉiuj normale evoluintaj infanoj en certa aĝo rigardos diversajn aĵojn kiel vivaĵojn, kiujn ni plenkreskuloj rigardas kiel senvivajn?»

Nun, la ekzemplo pri la krajono donas al ni signon. Uli ja motivas la postulon: «La krajono venu!» per la indiko: «La krajono ja povas ruliĝi, ĝi povas moviĝi». Tiel Uli povus plue pensi: «Kiam *mi* povas moviĝi, kaj kiam mi iras pro la alvoko de mia patrino al ŝi, tiam ankaŭ la *krajono* povas veni al mi laŭ mia alvoko, ĉar ankaŭ ĝi povas moviĝi». La pripensado de Uli inkluzivas ĉi-tie klaran konkludon: «Kiam..., tiam...»

Tio estas klara logika pripensado. Sed ankaŭ alia klara logika pripensado estus doninta al li la informon, ke krajono — kiu okaze povas ruliĝi per alpuŝo aŭ sur klinita ebenaĵo — ke tia krajono estas malviva korpo, kiu laŭ neniuj alvoko povas veni memstare. Ĉi-tiu logika pripensado povus teksti: «Kiam la krajono estas produktita el desegita, do el malviva peco da ligno, kaj kiam ĝi estas plenigita per anorgana, do per malviva kranonmino, tiam ĝi ne povas esti vivaĵo.» Nun, ĉi-tiu pripensado estas tro alta por dujara infano. Uli ankoraŭ ne povis fari ĉi-tiun logikan konkludon. El tio rezultas la demando je la evoluo de la logika pripensado ĉe infanoj. Sed ĉi-tie mi ne volas esplori ĉi-tiun evoluon.

Per la noto pri Uli kun 11 monatoj (Paperon en la buŝon, paperon disŝirita, paperon alrigardita) mi povis argumenti, ke infanoj — jam antaŭ ol ili parolas kompletajn frazojn — povas fari logikajn konkludojn. Ĉar ĉi-tiu observo montras, ke Uli faris sperton: Papero ne estas bongusta. Memkompreneble li ne povis pensi ĉi-tion per frazo, sed li nur povis vicigi sentojn: La sento de maldika materio, kunligita kun la aŭdado de susuro sekve de kunpremo, ĉi-tiu materio donas manĝomalĝuon. La intersperto — multfoje ripetita — ke oni povas disŝiri ĉi-tiun materion (kontraŭe al tekstita ŝtofo, kiu estas simile per mantuŝado), ĉi-tiu intersperto kondukis per pli posta mantuŝado al la logika pripensado: «Kiam mi mantuŝas tian maldikan, susurantan materion, kiu ne estas disŝirebla, tiam ĝi ne estas bongusta.»

Tiaj logikaj rigardaĵoj povas alporti la infanojn — jam antaŭ la parollernado — al la konkludo: «Kiam la aĵo (elble la krajono) povas moviĝi, kiel mi povas moviĝi mem, tiam ĉi-tiu aĵo devas esti vivaĵo, kiel mi ankaŭ». Sed ankaŭ ĉi-tiu fakto ne iĝas konscia al la infanoj, nur la instinkta konkludkapableco lasas senti ilin tion, kiel ni vidis tion ĉe la paperoekzemplo. Ke la infanoj (ĉirkaŭe depon unu jaro) povas veni al tiaj falsaj konkludoj, tio havas la kaŭzon en tio, ke ili en ĉi-tiu aĝo ankoraŭ ne povas kompreni la efektivan kaŭzon de la kranonmovado. Nur kiam la infanoj komencas esplori la kaŭzojn, kiuj staras malantaŭ la diversaj aperaĵoj, nur tiam ili po-

vas komenci revizii la falsajn konkludojn. Kaj kiam la infanoj komencas tion? Nun, en la «kial-aĝo.» Tiam la infanoj ĉesas, nur registri impresojn (tion ili faras en la «kio-estas-tio-aĝo», tiam ili komencas demandi pri la efektivaj kaŭzoj.

La «kial-aĝo» komenciĝis ĉe niaj infanoj kun ĉirkaŭe tri jaroj. Uli, la plej talenta rilate la natursciencojn, jam komencis kun 2/3 jaroj, dum Martin atendis ĝis 3/5 jaroj. Memkompreneble la «kial-aĝo» ne finiĝas, nur la intenco reiras. Estus interese scii, kiam la infanoj komprenas sian eraron, kaj kiam ili ne plu rigardas ĉiun aĝon kiel vivaĵon. Memkompreneble ĉi-tiu kompreno estas malrapida procedo. Sed mi opinias, ke mi trovis rimarkilon, kiu ekkonebligas konscion, ke ekzistas nur relative malmultaj efektivaj vivaĵoj.

Krom mia kolekto de pli ol 3000 infaneldiroj, mi ankaŭ konservis ĉirkaŭ 3500 desegnaĵojn de miaj infanoj (ordigitaj laŭ la tempo). Kaj la tempo, kiam ili komencis desegni «fabelbildojn» indikas, ke la infanoj provas kompensi la perditan miraklo-mondon per fabelbildoj. Sed la unuaj fabelbildoj estas desegnitaj nur mezmezure 1 1/2 jaroj post la komenco de la «kial-aĝo». Tio estas signo por tio, kiel malfacile estas por la infanoj ŝanĝi sian ĝisnunan mondobildon. Memkompreneble mi scias, ke la observoj ĉe niaj kvar infanoj ne povas doni ĝeneralvaloran bildon; tamen mi opinias, ke la fakto de fabelbild-komenco — oni trovas ilin ĉe preskaŭ ĉiuj infanoj — estas signo por kompensa forpuŝo de la ĝisnuna opinio en fabelecan ĉirkaŭaĵon.

El mia kolekto de la infandesignaĵoj sekvas krome, ke la infanoj desegnis diferenmultajn fabelbildojn kaj diference longdaŭre laŭ ilia aĝo. Dum Anne — ŝi estas plej multe destinita per siaj sentoj, per sia animo — pentris la plej multajn fabelbildojn kaj ankaŭ plej longdaŭre. Uli, la naskita naturscienculo, pentris nur malmultajn fabelbildojn kaj nur mallongdaŭre. Krome li komencis jam trikvarona jaro pli frue ol Anne pentri tiajn bildojn. Ja, kiam Anne pentris la unuajn fabelbildojn (4/7 jara), tiam Uli ne plu pensis je fabelbildoj. Jam 3/9 jara li diris: «Mi ne plu volas aŭdi fabelojn.»

Internacia Ligo Esperantistaj Instruistoj ILEI 16a Internacia Konferenco

Sejano di Vico Equense - Na (Italia) 15-24 / 7 / 1982

ILEI Dazzini Mario, c.p. 22, I-54100 Massa, Tf. 0585/41756

LKK Rolando Incoronato Pia, Via Panoramica 63, I-80056 Ercolano (Na), Tf. 081/7392211.

ALIĜILO

(Bonvolu skribi klare, legeble, laŭeble tajpe aŭ preslitere)

S-ro (S-rino, F-ino)

Familia nomo Antaŭnomo

Lando Naskiĝjaro

Loĝurbo Strato n°

Samtempe aliĝas per aparta aliĝilo:

Edz(in)o infanoj

Kotizoj

	ĝis 1/1/82	1/5/82
Por ILEI-anoj	31/12/81 30/4/82	31/5/82
Unulita ĉambro	288.000 295.000	300.000
Dulita ĉambro	243.000 250.000	255.000
Trilita ĉambro	220.500 227.500	232.000
Kvarlita ĉambro	180.000 187.000	192.000

po
persono
po
persono
po
persono

nomo kaj antaŭnomo, Adreso — elektita kategorio — 16-a ILEI-konferenco en Seiano. (Post la ricevo de la kompleta pago, LKK havigos konfirmilon).

Mi alvenos la
per trajno, aŭtomobilo, aviadilo.

Por atingi la konferencejon en Seiano (Hotelo Moon Valley), se vi alvenas

1) trajne al Napoli (Stazione Centrale — Centra Stacidomo) bonvolu trafi, en la stacidomon, per rultapiŝo la "Ferrovia Circumvesuviana"n, en la direkto de Sorrento, ĝis Seiano.

2) aviadile al flughaveno de Napoli. De tie per aŭtobuso al la stacidomo de Napoli kaj poste kiel supre.

3) aŭtomobile al Napoli kaj poste per aŭtoŝoseo de Napoli ĝis Castellammare di Stabia kaj de tie al Vico Equense-Seiano.

Por la ne-ILEI-anoj la supreindikitaj prezoj plialtiĝas je 10.000 liroj. En la kotizoj estas enalkulitaj krom la tranoktoj, ankaŭ la manĝoj, de la vespero de la 15/7 ĝis la tagmanĝo de la 24/7.

Mi sendu la aliĝilon al LKK kaj verŝu la kotizon, laŭ la supreindikitaj kotizoj, per poŝtĝirkonto n. 11244548, Prof. Dazzini Catina Giulia, c.p. 22, Massa (Italia). Dorse de la enpagilo menciu nepre: Familia

Deziro de komuna loĝado kun S-ro/S-ino/F-ino

Specialaj deziroj (laŭeble) Subskribo

Atentu LKK ne certigos loĝadon al tiuj kiuj aliĝos post la 31a de Majo 1982.

Koordinatoj

Corrie Sanders, Nederlando

Rimarkigo de la redaktoro:

Kolego Berveling el Vlaardingen (Nederlando) sendis al mi leteron por prezenti matematikaĵon de sia kolegino, kiu ne regas Esperanton. Perante li skribas:

Supozante, ke en IPR rajtas aperi ne nur verkaĵoj pri kunvenoj, kongresoj k.s. — ke rajtas aperi en ĝi eĉ ne nur studoj pri la instruado de lingvoj ĝenerale aŭ pri la instruado de Esperanto specife, — mi ĉi tie sendas kontribuon eltute alia tereno.

Kolegino mia, s-ino C. W. Sanders-Koppers, jam de jaroj instruas pri matematiko en nia lernejo-komunumo, kaj tion kutime ŝi faras en la komencklasoj, do al 12-jaraj aŭ 13-jaraj gelernantoj.

Nu, kiel sciante, inter tiuj ofte regas forta antaŭjuĝo, kvazaŭ matematiko estus tre teda, enuiga, por simpluloj nekomprenebla.

Iam en la komencklaso, la instruo temas pri koordinatoj, la nombroj difinantaj la situon de punktoj en ebena (laŭ PIV). Sed kiel tede sen pli provi trovi dekojn da tiaj punktoj sinsekve! Do ekdormas ĉe aliaj ofte la lernantaro, — sed ne ĉe Corrie...

Ŝi eltrovis metodon por fari tion alloga la trejnadon... Nuntempe eĉ dum instruohoroj de tute aliaj fakoj ofte la infanoj petas, ĉu ili rajtas iom plu labori por matematiko...

Ŝi faris plurajn desegnojn, eltrovis mem la koordinatojn necesajn por retrovi la bezonatajn punktojn, — kaj post interligo pere de streketoj inter la trovitaj punktoj montriĝas... la bela bildo.

Uzante paperon kun etaj kvadratoj (45 × 41 kvadratoj), kies longa flanko estu «horizontale» antaŭ la skribanto, vi trovu unue la nulpunkton ĉe la interkruciĝo de la 15-a linio de sube kaj la 23-a linio de maldekstre, kaj poste la jenajn listigitajn punktojn.

Streko inter la nomitaj punktoj signifas, ke tiujn oni ligu. Jen la koordinatoj!

Se kolegoj inter la legantaro de IPR ŝatus ekuzi ŝian metodon, ili rajtas fari tion, kondiĉe ke oni sendu unu kopion de sialingva traduko al Corrie Sanders, kaj oni presigu sur la stencilon uzotan en la lernejo la indikon, ke la ideo venas de la Lernejo-komunumo Westland-Zuid el Vlaardingen, Nederlando.

Gerrit Berveling

Verbind de aangegeven punten, waar een streepje tussen staat, met elkaar. Neem het roosterpapier dwars en zet 0 bij het snijpunt van de 15^e roosterlijn van de onderkant af gerekend en de 23^e roosterlijn van links.

(15, 14 1/2) — (15, 12) — (12, 15) — (9, 16) stop. (12, 13) — (9, 15) — (8, 15) — (7, 14) — (7, 13) — (8, 9) stop. (10, -7) — (8, -7) — (7, -6) — (6, -6) — (5, -7) — (6, -9) — (8, -10) — (10, -10) — (11, -8) — (10, -7) stop. (17, 11) — (17, 12 1/2) stop. (18, 1) — (17, 4) — (18, 4) — (18, 3) — (17 1/3, 3) — (17, 4) — (17, 5) — (18, 5) — (19, 4) — (19, 3) — (18, 1) stop. (14, 0) — (12, 4) — (13, 4) — (13, 3) — (12 1/2, 3) — (12, 4) — (12, 5) — (13, 5) — (15, 3) — (15, 2) — (14, 0) — (15, 0) — (16, 3) — (16, 7) — (15, 9) — (14, 10) — (13, 10) — (12, 8) — (12, 5) stop. (7, -1) — (6, 0) — (4, 0) — (2, -1) — (1, -2) stop. (16, -1) — (18, 0) — (19, 2) — (20, 3) — (22, 4) — (24, 7) — (26, 8) — (28, 8) — (30, 6) — (30, 4) — (29, 1) — (27, -2) — (26, 3) — (24, -4) — (23, -2) — (22, 1) — (22, 4) — (21, 7) — (20, 9) — (18, 11) — (16, 14) — (14, 15) — (11, 16) — (7, 16) — (5, 15) — (4, 14) — (3, 12) — (3, 11) — (4, 8) — (6, 4) — (7, 3) — (8, 3) — (4, 3) — (0, 2) — (-3, -1) — (-4, -3) — (-4, -4) stop. (17, -8) — (14, -7) — (7, -4) — (5, -2) — (4, 0) — (4, -2) — (3, -5) — (4, -8) — (6, -10) — (8, -11) — (10, -11) — (12, -10) — (14, -7) stop. (18, 0) — (18, 1) — (17, 4) — (17, 8) — (18, 9) — (19, 9) — (20, 7) — (20, 3) stop. (5, 15) — (6, 17) — (6, 18) — (5, 21) — (3, 23) — (-1, 25) — (-5, 25) — (-9, 24) — (-11, 23) — (-13, 21) — (-14, 19) — (-14, 17) — (-13, 15) — (-11, 13) — (-9, 12) — (-6, 11) — (-2, 11) — (-4, 10) — (-6, 8) — (-8, 10) — (-10, 11) — (-15, 11) — (-19, 10) — (-21, 8) — (-22, 5) — (-22, 1) — (-21, -2) — (-19, -5) — (-16, -6) — (-12, -6) — (-10, -5) — (-6, -1) — (-2, -7) — (1, -9) — (3, -9) — (5, -11) — (8, -13) — (10, -13) — (13, -12) — (15, -11) — (17, -8) — 21, -8) — (26, -7) — (28, -6) — (29, -5) — (30, -3) — (30, 0) — (29, 1) stop. (25, 0) — (25, 1) — (26, 1) — (26, 0) — (25, 0) stop. (24, 3) — (24, 5) — (25, 6) — (27, 6) — (28, 4) — (28, 1) — (27, 3) — (26, 4) — (25, 4) — (24, 3) stop.

Estraraj raportoj 1979-1982

La anoj, samideanoj, gekolegoj, membroj kaj nelacemaj kunlaborantoj de I.L.E.I. havas senduban rajton postuli de mi laborraporton pri trijara servado al nia Ligo.

La raporto jam pro tio estas facila al mi, ĉar ĉi tie oni efektive povas servi al granda nobla ideo, kiu ne dikigas la bankkonton, ne donas salajron, eble dankon.

Se oni staras antaŭ trijara elektperiodo ĝi jekomence ŝajnas esti longa tempo, sed je la fino la tempo rapidas.

Ni sekvu kelkajn agadojn!

1979

Okaze de la 13-a konferenco, ILEI partoprenis la «Internacian Jaron de la Infano» kunlaborante al la alvoko de UNESKO sub la propra moto: Ne rasoj sed ni infanoj vivas en la mondo. En la sama inaŭgura temo (Internacia Jaro de la Infano, mi emfazis la rolon de la infano, ke ĝi estas la respondo al la vivo, al plua evoluo de la mondo kaj ke ĝi estas kvazaŭe la praforto de la vivo- la garantio, ke la mondo ne tute ĉesos! (IPR/1979/3)

En ĝia rezolucio la konferenco postulis, ke tiu ĉi jaro ne restu en la kutima sekvo de la ĝisnunaj proklamitaj jaroj, sed ke la infano meritu ĉiajn konstantajn streĉojn de la tuta socio kaj ĝi finiĝis per alvoko pri profundigado de la infana klerigado kaj konduko al internacia inerkompreniĝo.

1979 aperis ankaŭ la unua libro de ILEI: Helmut Sonnabend-Esperanto lerneja eksperimento- raporto, - analizo, — konkludo.

El la dokumentaro de ILEI, Centro Eŭropo, dua regiono. Serio: Kajeroj de Internacia Pedagogia Revuo n-ro 1. Edistudio, Pisa 1979. La libro estas la rezulto de scienca eksperimento en pluraj elementaj lernejoj en Grekujo, Francujo, Belgujo, Nederlando kaj Germanujo. En Germanujo (Malsupra-Sakcio) ni daŭrigis la lernejan eksperimenton kaj finis ĝin 1980. Sekve ni nun havas la rajton instrui Esperanton en elementaj lernejoj dum devigaj laborrondoj. Mi kontaktas regule plukondukantajn lernejojn por studi la pluan evoluon de niaj «Esperanto-infanoj»

Por konatigi al internaciaj instancoj en Eŭropo niajn rezultojn mi skribis resumon pri nia libro, tradukigis ĝin per helpo de niaj sekcioj kaj antaŭmetis ĝin al ili.

Sufiĉe da multnombraj respondoj almenaŭ pruvis favoran atenton!

Jam komence de la jaro 1979 mi veturis al Parizo por organizi la ILEI-simpozion en la universitato René Des Cartes-La Sorbonne-Lingvistika Fakolo de 18-20 Oktobro 1979.

Mi nomis la ĝeneralan temon poste akceptitan:

Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia — eŭropa lingvo. La rezulto de la simpozio kunmetita en komuna rezolucio kaj decidita de la partoprenintaj scienculoj, fakuloj kaj pedagogoj estis ankaŭ tradukita en pluraj lingvoj kaj sendita al universitatoj en la mondo kaj kompreneble al UNESKO.

1980

Komence de 1980 mi postulis, ke la oka jardeko estu por ILEI la «jardeko de la infano». Tial mi proponis kiel temon por nia 14-a konferenco: Edukado. Pro la fakto, ke kvindek procentoj de la homaro estas analfabetoj ni pritraktis la demandon dum nia konferenco en Malto: Kiamaniere Esperanto povas helpi venki la analfabetismon?

La unuanima rezolucio esprimas sian zorgon pri la manko de humaneca internaciismo, pri la multnombro de analfabetoj en la mondo. Ankaŭ sekvis la komitato la proponon de la estraro solidariĝi kun la alvoko de s-ro M' Bow — ĝenerala sekretario de UNESKO — pro savo de la unika historia kulturo sur Malto.

Okaze de la 14-a konferenco la komitato aprobis mian proponon fondi studgrupon pri «Metodika kaj Didaktika Servo de ILEI.»

Tiaspeca laborgrupo fondiĝis kaj IPR/1980/3 prezentis la elementojn de la plano celante apogi praktike la instruadon de Esperanto. (Nepre disponigu viajn spertojn, por ke aliaj gekolegoj profitu el via laboro! Estas ja nia malsano: ideoj abundas, kunlaboro mankas.)

En la sama jaro mi kunvokis la estraron al Strasburgo (sidejo de la Eŭropo-Parlamento) de la 15-a ĝis la 17-a de Junio. El nia estrarkunsida laboro mi nomas du apartajn punktojn:

La akcepto de la estraro de ILEI far de ĝenerala sekretario, s-ro Heinz Opitz, Eŭropo-Parlamento.

Tie ĉi ni transdonis de mi verkitan kaj kompilitan kaj de la estraro aprobitan memorandon pri la lingvo-Esperanto, krom en nia lingvo ankaŭ en itala, hispana kaj germana lingvoj. Aldone ni enmanigis du ekzemplerojn:

Esperanto-lerneja eksperimento- raporto, analizo, konkludo, kun la rezumoj en angla kaj germana lingvoj.

La ĝenerala sekretario disponigis al ni la adresaron de la eŭropaj parlamentoj.

La posta hejma laboro estis por mi streĉa kaj temporaba. Mi multobligis la memorandon (420 ekzempleroj) Mi petis la tradukojn en la lingvojn bezonatajn, multobligis ankaŭ ilin, ordigis ilin laŭ ŝtatomembroj, enkovertigis ĉion kun akompana afabla letero, petante atentigon. (vidu la tekston — IPR — 1980/3)

La rezulto estis tre interesa (konsideru, ke ankaŭ nerespondoj estas respondoj!): alvenis dekoj da respondoj de la germanaj parlamentanoj, du italaj, kvin anglaj. Resume: Pluraj sentas la babelan farson en la sistemo, sed sentas sin malhelpemaj por ŝanĝi ion- la plimulto estas por plimulteco, do, la infanoj lernu almenaŭ du lingvojn.

Mi proponis al la estraro (ĝi konsentis) eldonon de porinfana adresaro (t.n. ambasadora sistemo) kun la indiko pri la ŝatokupado (malfermo de infaneta reto).

Dum mi skribas mian raporton, mi havas ĉemane «Kara Amiko!» eldonaĵo de Kastora Klubo por infanoj, eble jen subteninda perioda foliaro, la bazo por la «Infana Reto»!

1981

La celo de nia statuto: «La edukado al estimo de la homo kaj al interkompreniĝo inter la popoloj instigu nin al pli principa agado kaj kunlige kun ĝi al la konvinko, ke ne multe helpas kaj utilas, streĉe organizi grandajn kampanjojn por konvinki aŭtoritatojn, oficialulojn...

Simpla, konstanta, fakkompetenta instruado al infanoj- tio estu la ŝlosilo. Ni mobilizu la «infanan rason» ĉie en la mondo!

Tamen mi okupiĝis pri tre interesa demando el la parlamento de Bavarujo (IPR 1981/2) kaj pri la ŝajne objektiva respondo de la bavara kulturministro Hans Mayer. Ĝi estas tipa pri la sinteno rilate Esperanton kaj nur fortigas min en mia konvinko, ke la nuna «matura» intelekto «preta» generacio estas malutila por la nobla ideo de homoj ligataj per homa lingvo. Ni faru ĉion, por solvi nian taskon: instrui niajn infanojn!

Fidele al sia tasko la estraro daŭrigis la vicon de siaj konferencoj en Gödöllő/Hungario de 11-a ĝis 21-a de Julio 1981.

Kvankam mi devis iri en kuraclokon, mi partoprenis la inaŭguron kaj festparoladis pri la temo de la konferenco:

La unuiga rolo de Esperanto de diversaj sociaj/lingvaj sistemoj poste mi estris estrarkunsidon kaj bedaŭrinde devis reveni al mia kuraca loko.

Tamen restis al mi sufiĉe da tempo por prezenti la enhavon de nia nova rezolucio. Detale okupiĝis la estraro kun la unuopaj frazoj, ke ekz. la nuna internacia edukado al estimo, kompreniĝo, kulturaj interŝanĝoj pro la nesufiĉeco de la fremdlingva instruado donas kaŭzon al serioza zorgo. La rezolucio alvokas al pedagogia konferenco en la jaro 1987.

Mi tre ĝojis ke la konferencanoj unuanime akceptis la rezolucion kiu tradukite en la lingvojn de la mondo informu pri la intencoj de ILEI- se ni ne povas konvinki niajn homojn ni almenaŭ maltrankviligu ilin!

La estraro de ILEI denove kunvenis al estrarkunsido en Peine (loĝloko de mi) 16.11. — 18.11.

Ĉar ĉiuj sekiestroj ricevis la protokolon kaj ankaŭ la rezulton de nia ekzakta tralaboro de nia statutprojekto: mi citas el la protokolo: La estraro studis la statutpro-

jekton publikigitan en IPR 1981/2 kaj post modifoj kaj strekoj en diversaj paragrafoj kaj de la statuto kaj de la regularo, unuanime akceptis ĝin kiel *proponon* de la estraro de I.L.E.I.

Ĉu nun la estraro de I.L.E.I. estas h.s. nur ruza kaj nedemokratia, uzi la rajton proponi? (Aserto de s-ro Hoekstra al ĉiuj sekcioj!)

Raporto de la Ĝenerala Sekretario

La preparo de la 14-a Internacia Konferenco en Locarno (20-27/7/1979) alportis sufiĉe da laboro, precipe pro la organizo de la monda ekspozicio de infandeseĝnaĵoj, alportitaj el Parizo de Prof. James Fairbank, kiu ricevis la viziton de la Prezidanto de UEA D.ro Humfrey Tomkin. La konferenco, al kiu partoprenis pli ol 163 delegitoj el la 5 kontinentoj, estis plensukcesa, danke al la helpo de S.ro Greutert kaj S.ro Bertolini. Tuja rezulto de la konferenco estis la starigo de Esperanto-grupo en Locarno sub la gvidado de S.ro Bertolini.

Tuj post Locarno pliiĝis la kontaktoj kun s.ro Carmel Mallia en Malto kaj la vizito al la insulo kronis sukcese la strebojn por la revivigo de Malto Esperanto-Societo kaj por la organizo de la 14-a Internacia Konferenco (24/7-1/8/1980), kiu okazis sukcese kun la partopreno de 62 delegitoj el 9 landoj, danke al la helpo de S.ro Mercieca kaj Prof. Vella Bondin.

Danke al la bona preparado fare de LKK en Gödöllő (Hungario) la laboro por la organizo de la 15-a Internacia Konferenco ne estis tiel peniga: cetere pro mia malsano mi ne estus povinta doni mian kutiman helpon en la organizado de la konferenco, kiu plene sukcesis (11-21/7/1981) pro la elstara nivelo de la prelegantoj kaj pro la partopreno de 161 delegitoj el 15 landoj, krom junuloj el Jugoslavio kaj Hungario.

Ne sukcesinte organizi la 16-an internacian konferencon en Hispanujo, post la decido de ILEI-estraro esplori la eblecojn en Italio, mi veturis al Suda Italio kaj danke al la helpo de Prof. Polese Luigi kaj Prof. Rolando Incoronato Pia oni sukcesis organizi la 16an Internacian Konferencon (15-24/7/1982) en Seiano de Vico Equense, en la mirinda golfo de Napoli.

Danke al la interesiĝo de S.ano Albertino Dos Santos Matias, prezidanto de Portugal Esperanto-Asocio, oni decidis organizi la 17-an Internacian Konferencon en Portugalio dum Julio 1983.

Dum Setembro 1979 mi partoprenis en Vieno la 50jaran datrevenon de la fondiĝo de la Viena Muzeo en Hofburg, kaj la trilandan renkontiĝon (Italio-Aŭstrio-Jugoslavio) en Graz.

Dum Oktobro 1979 mi flugis al Malta por la preparo de la 14-a Internacia Konferenco kaj mi partoprenis en Parizo al la Simpozio ĉe Universtiato René Des Cartes.

Dum Junio 1980 mi ĉeestis la estrarkunsidon de ILEI en Strasburgo (Francio)

Dum Novembro 1981 mi partoprenis la estrarkunsidon de ILEI en Peine (Germanio)

Helmut Sonnabend

Laŭ statistika vidpunkto povas interesi la informo ke mi forsendis dum 1979 6 cirkulerojn, dum 1980 5 cirkulerojn, kaj dum 1981 5 cirkulerojn.

Pri la senditaj poŝtaĵoj oni povas kalkuli pri meznombre jare de proksimume 500 leteroj kaj presaĵoj.

Eble mi eraras, sed mi ricevis la impreson ke dum la lastaj tri jaroj, pro la kreskantaj militkonfliktoj burĝonantaj en la mondo, malkreskis kaj malpliigadis flanke de la sekcioj de la Ligo en la mondo, la laboremo kaj en la organiza kaj en la instrua kampoj.

Certe ankaŭ pro la malsanoj kiuj trafis tri el la kvin membroj de la estraro, ne estas mirinde ke la situacio en la kresko kaj plifortigo ĝenerale de la Ligo ne estis floranta. Mi sentas la devon kaj la deziron danki al tiuj sekciestroj kiuj faris ĉian eblon por helpi kaj eviti malsukcesojn.

Mario Dazzini

Raporto de la vicprezidanto de ILEI

Mi partoprenis la konferencojn en Locarno kaj en Gödöllő. Bedaŭrinde pro grava malsano mi ne povis partopreni la konferencon en Malta.

Laŭ la statuto mi alsendis al la ĝenerala sekretario la al mi senditajn statistikojn, ricevitajn de la sekcioj.

Mi partoprenis en la LKK de la 15-a Konferenco. Mia tasko estis la organizo de la renkonto kun la oficiuloj, kaj la programo de la inaŭguro.

Dum la 15-a konferenco en Gödöllő okazis amika interparolo inter la estroj (representantoj) de Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokrata Respubliko, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando, sub la gvidado de la hungara sekciestro s-ino Zsuzsa Barcsay.

La interparolo celis la intensan kunlaboro kaj regulan informadon de Esperanto—edukado en la socialismaj landoj.

Mi — en la nomo de ILEI — sendis personan leteron al la estroj de la Esperanto Asocioj, en la menciitaj landoj (kaj al Sovetunio kaj Rumanio) petante ilin apogi la intensan kunlaboron. (La kopiojn mi alsendas).

En oktobro ĉijare mi vojaĝis en Kosiĉe (Ĉeĥoslovakio) kie mi renkontis kun kelkaj slovakaj epsernatistoj. Mi informis ilin pri la agado de ILEI, proponante al ili, starigi ILEI sektion en Slovakio.

Mi petis nian ĝen. sekretariojn, sendi la bezonatan inform materialon al la donita adreso.

Pri mia vizito en Slovakio publikigis artikolojn la hungarlingva oficiala gazeto en Kosiĉe, Uj Szó, kaj la Slovaka Esperantisto.

Mi partoprenis la estrarkunsidon en Peine (15.-18.11.81.)

János Ingusz
vicprezidanto de ILEI